

Heinrich Heine,  
[Diru vi, ho karulino]

*tradukita de Manfred  
Retzlaff*

Diru vi, ho karulino,  
Nun al mi, ĉu estas vi  
Songobild' el mia sino,  
El poeta fantazi'?

Sed ne! Tian infaneton,  
Tian ravan brilon de  
La okuloj, la buŝeton,  
Kreas la poeto ne.

Baziliskojn, vampiraĉojn,  
Drakojn, de l' infero la  
Plej timigajn fi-bestaĉojn  
Kreas la poeto ja.

Sed ne! Vin, malicon vian,  
La vizaĝon ravan, - ve! –  
La rigardon false pian  
Kreas la poeto ne.

...

Heinrich Heine,  
[Liebste, sollst mir heute  
sagen]

Liebste, sollst mir heute sagen:  
Bist du nicht ein Traumgebild,  
Wie's in schwülen Sommertagen  
Aus dem Hirn des Dichters quillt?

Aber nein, ein solches Mündchen,  
Solcher Augen Zauberlicht,  
Solch ein liebes, süßes Kindchen,  
Das erschafft der Dichter nicht.

Basilisken und Vampire,  
Lindenwürm und Ungeheur,  
Solche schlimmen Fabeltiere  
Die erschafft des Dichters Feur.

Aber dich und deine Tücke,  
Und dein holdes Angesicht,  
Und die falschen frommen Blicke -  
Das erschafft der Dichter nicht.

...

Heinrich Heine,  
[Karulin', vi devas  
diri]

*tradukita de Leopold Blumental*

Karulin', vi devas diri,  
Ĉu ne songo estas vi,  
En somera tag' florinta  
El poeta fantazi'?

Ne! erar'! ... Buŝeton tian,  
Sorĉon de la okulet',  
Tiel dolĉan knabinton  
Ne ekkreas la poet'!

Nur vampirojn, baziliskojn,  
Monstrojn, idojn de malam',  
Nur terurajn fablajn bestojn,  
Poetara kreas flam'!

Vin do ... kaj ruzecon vian  
Ĉe anĝela vizaĝet',  
La rigardojn piajn ..., falsajn ...  
Ne eksongos la poet'!

...

Traduko de la Germana poemo “[*Liebste, sollst mir heute sagen*]” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).

Arg-555-1120 (2010-09-13 20:55:11)

La poemo troviĝas en la „*Libro de la kantoj*“, sekcio „*Junaj suferoj - romancoj*“, n-ro XVI.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17).

Arg-555-1119 (2010-09-13 20:50:23)

Das Gedicht befindet sich in Heinrich Heines Werk „*Buch der Lieder*“, im Abschnitt „*Junge Leiden – Romanzen*“, Nr. XVI.

Traduko de la Germana poemo “[*Liebste, sollst mir heute sagen*]” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD BLUMENTAL (*Leo Belmont*, \*1865-03-08 – †1941-10-19).

Arg-555-1122 (2010-09-13 22:21:04)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto “*H. Heine - Libro de Kantoj*”, eldonita en 1911 de la “*Esperanto-Propaganda Instituto*” (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] La germanan originan version verkitan de Heinrich Heine vidu: “*Buch der Lieder*”, sekcio “*Lyrisches Intermezzo*”, n-ro XVI. - Informoj pri la tradukinto Leopold Blumental (kaŝnomo: Leo Belmont) troviĝas en la vikipedia retejo [http://eo.wikipedia.org/wiki/Leo\\_Belmont](http://eo.wikipedia.org/wiki/Leo_Belmont).